



Ĉi-jare JES bonvenigas vin en la urbo Weißwasser en Supra Luzacio! Venu kaj festu la novan jaron kun ni!

Jen kelkaj utilaj informoj por via partopreno kiel alvenebloj, aliĝilo al ekskursoj, kunportindaĵoj kaj kiel prepariĝi por kelkaj programeroj dum la aranĝo

## **Kongresejo**

La adreso de la Kongresejo estas

KiEZ "Am Braunsteich"  
Am Braunsteich 6  
02943 Weißwasser

Ĝiaj koordinatoj estas

N 51°50'70.06", E 14°67'46"

Ĉiu programero (krom la ekskursoj) okazos en la sama konstruaĵo.

La (germanlingva) retpaĝo de la KiEZ estas <http://kiezbraunsteich.de/>

## **Telefonnumeroj dum la aranĝo**

Maximilian König (Ĉeforganizanto) : **+49 151 10975366**

Paul Mätzig (Akceptejo) : **+49 160 95300730**

## **Akceptado**

Post via alveno en la KiEZ ni petas vin veni al la akceptejo. Ĝi troviĝas en la unua etaĝo kaj oni bonvenigos vin tie la 28-an de decembro post la 12-a horo. En la akceptejo vi pagos restantan kotizon (se estas) kaj ricevos informojn pri la ĉambro.

Dum la aranĝo **ni nur povas akcepti pagojn en eŭroj (EUR)** kaj povas akcepti nek bankokartojn nek ĉekojn.


La unua manĝo la 28-an okazos inter la 19-a kaj la 20-a horo. Se vi alvenos pli malfrue, aŭ ĝenerale ne povos veni al JES, bv. skribi al [jes@pej.pl](mailto:jes@pej.pl) tion, por ke ni povu malmendi viajn manĝojn kaj povu fordoni vian lokon.

## Alveno al **Weißwasser (Oberlausitz)** per trajno

Weißwasser troviĝas sur la trajnlinio inter Görlitz/Zgorzelec kaj Cottbus. Do por alveni trajne simple vojaĝu ĝis unu el tiuj du urboj kaj prenu trajnon de la linio OE65 de “Ostdeutsche Eisenbahn GmbH” (ODEG - Orientgermana fervoja kompanio). Dum tago estas trajno je ĉiu horo en ambaŭ direktoj. Plej facilas serĉi vian vojaĝon per [http://www.bahn.de/p\\_en/view/index.shtml](http://www.bahn.de/p_en/view/index.shtml) – Eblas ŝanĝi la lingvon en supra parto de la retpaĝo, klakante sur “English version”.

## Alveno per Karavano

Ekzistas multbranĉa karavano al JES. Se vi ŝatas vojaĝi malmultekoste kun mojosaj esperantistoj, informiĝu kaj aliĝu ĉe <http://www.alesk.eu/karavano/jes2014/>



Piedvojo de la stacidomo al la JES-ejo

## Piede de la stacidomo **Weißwasser (Oberlausitz)**

- De la placo antaŭ la stacidomo (kie troviĝas “Turm Café” kun tureto, “Sparkasse” kaj “Apotheke am Bahnhof” iru rekten kaj sekvu la “**Straße des Friedens**”
- Post ĉ. 500 m sur granda vojkruciĝo (je ĝi troviĝas bakisto “Dreißig”) turnu maldekstren kaj sekvu la “**Muskauer Straße**”
- La 2-a strato dekstraflanke estas “**Waldhausstraße**”, kiun vi sekvu
- Sekvu ĝin por **2 km** (ekzistas ŝildoj montrante “KiEZ”, ni aldone pendigos afiŝojn por montri la vojon), vi trapasos la “Braunsteich” (“bruna lago”) kaj la “Gasthaus Waldhaus” (ambaŭ dekstraflanke)
- Poste turnu dekstren kaj post 300 m vi alvenas al la KiEZ sur la dekstra flanko.

Ni strebas oferti ŝoforservon (almenaŭ por pakajoj) kaj tutcerte eblas organizi gruptaksion. Se vi ŝatus havi taksion bv. telefoni almenaŭ 30 minutojn antaŭ via alveno al +49 151 10975366 por ke ni povu organizi ĝin por vi.



Emblemo de la kongresejo

## Alveno per Aŭto

Eblas senprobleme parki ĉe la KiEZ (JESejo)

## Kunportindaĵoj

- Varmaj vestaĵoj
- Littukoj (vi ankaŭ povas lui ilin de la ejo por 3 €)
- Ludiloj kaj muzikiloj
- Manĝaĵoj kaj trinkaĵoj por Internacia Kuirarta Festivalo (IKF)
- Dormsako kaj matraco (se vi loĝos en amasloĝejo)

En la ĉirkaŭo de JES-ejo troviĝas 2 naĝejoj (simpla subtegmenta naĝejo kaj libertempa naĝejo) kaj ankaŭ glitkurejo. Do ne forgesu vian naĝkostumon! Sketiloj ankaŭ lueblas en la halo.

## Ekskursoj - ALIĜU NUN!

Dum la ĉi-jara JES ni proponas multajn interesajn ekskursojn. La mojosaj celoj de la tuttagaj ekskursoj, kiuj okazas la 2-an de januaro, estos du belaj kaj gravaj germanaj urboj. Vi povos elekti inter ekskursoj al:

- Dresdeno - ĉiĉeronado kaj vizito de la higiena muzeo,
- Berlino - ĉiĉeronado kaj vizito de la muzeo pri komputilaj ludoj.

Krome vi havos la eblecon partopreni du duontagajn ekskursojn, kiuj helpas ekkoni la pli proksiman ĉirkaŭaĵon de la JES-eja urbo Weißwasser. Vi povas

- viziti la soraban kulturcentron en Schleife aŭ,
- viziti parkon kaj kastelon en Bad Muskau.

Pli precizajn priskribojn de la ekskursoj vi trovos ĉe: <http://jes.pej.pl/ekskursoj/>.

**La aliĝilo al ekskursoj dum JES 2014 nun pretas, do nepre aliĝu nun al viaj plej ŝatataj ekskursoj:**

[https://docs.google.com/forms/d/1aOL75rWwoZ\\_9P18uWjFJKLNEAPoN5XVK4hJFviAwa7I](https://docs.google.com/forms/d/1aOL75rWwoZ_9P18uWjFJKLNEAPoN5XVK4hJFviAwa7I)

Via aliĝo gravas al ni ĉar la nombro da gvidantoj, kiun ni mendos, kaj tiel ankaŭ la maksimuma nombro de ekskursontoj dependas de la nombro da aliĝintoj antaŭ la 20-a de decembro, do aliĝu frue!

## Specialaj Programeroj

### Internacia vespero

Ĉu vi havas montrindan talenton, kiun la mondo devas vidi? Ĉu vi volas disdoni sperton pri parto de via landa kulturo? Ne plu longe vi devas atendi por via ŝanco!

Dum JES refoje okazos "Internacia Vespere", do pretigu vian programeron, por ke ni refoje povu ĉeesti buntan etoson de diversaj prezentotaj mojosecoj!

Se vi jam volas vin anonci skribu al [paulwuertz@posteo.de](mailto:paulwuertz@posteo.de) aŭ simple kunportu viajn necesajojn kaj enskribu dum JES.

Ĉiuj homoj estas bonvenotaj sin prezenti!

### Internacia Kuirarta Festivalo (IKF)

Ĉu vi interesiĝas pri la kulturoj de la mondo? Jen oportuno esplori ilin per via lango. Dum la IKF (Internacia Kuirarta Festivalo) vi povos senpage

provi diversajn eksterlandajn specialaĵojn. Pro tio, ĉiu partoprenanto kunportu ion de sia lando (manĝeton, sukeraĵon / kukon / keksojn, trinkaĵon, alkoholaĵon). Plej bonas famaj aŭ strangaj aferoj, kiujn oni ne sukcesas aĉeti eksterlande. Ĉiu lando havos tablon por prezenti la kunportitaĵojn kaj la ĉambro iĝos bazaro de malsamaj gustoj.

### Prezentu vian aranĝon

Ĉu vi organizas iun Esperanto-renkontiĝon en 2015? En la lasta tago de la finiĝanta jaro ni donos al vi eblecon reklami vian eventon. Dum speciala programo ĉiu havos je sia dispono kelkajn minutojn por inviti partoprenantojn de JES. Kunportu do ĉion, kio helpas al vi varbi! Se vi havas iujn specialajn bezonojn – mesaĝu al [jes@pej.pl](mailto:jes@pej.pl)

### **AMO vojaĝos al JES: ek al trejniĝo!**

Se vi spertiĝemas pri la ŝlosilaj agadoj por sukcese antaŭenigi E-organizon, nepre aliĝu al AMO-8, trejnseminario okazigota dum JES danke al la kunlaboro inter UEA kaj TEJO.

La seminario dum JES fermos la sukcesan ĉijaran serion da AMO-seminarioj, ligitaj al diversaj E-aranĝoj en Eŭropo, Ameriko, Azio kaj - parte paralele al la seminario dum JES - en Afriko.

Junularmedie jam okazis sukcesaj AMO-seminarioj dum JER (AMO-1, Horány, Hungario) kaj dum IJK 2014 (AMO-3, Fortalezo, Brazilo).

Dum AMO-8, kies ĉeftemo estos “Esencaj elementoj por sukcesa E-organizo”, vi povos trejniĝi pri kvar temoj: Grupformado, Informado, Eskteraj Rilatoj, Financmastrumado; la seminario okazos dum kvar duontagoj.

Se vi scivolemas, bv. ekkontakti la retadreson [at@tejo.org](mailto:at@tejo.org) !

### **Scienca prelegesio**

Ĉu vi estas sciencisto, esploristo, aŭ alia speco de fakulo kaj volas prezenti vian kampon? Prelegu dum JES! Post ege ĝueblaj prelegsesioj dum JES pasintjare kaj IJK ĉi-jare, la Komisiono de Scienca kaj Faka Agado de TEJO daŭras sian programeron de mallongaj prelegoj pri diversaj sciencaj temoj.

Sendu vian nomon kaj 3-frazan priskribon por 9-minuta prelego pri via temo al [woods@math.ucr.edu](mailto:woods@math.ucr.edu)

Ekzemplaj tri frazoj:

*La danĝeroj de intensiva bredado. Intensiva bredado de bestoj estas bezonata se la kreskanta homaro ne ŝanĝas sian kutimon pri viandmanĝado. Dum mia prelego mi parolos pri la efiko de intensiva bredado al la sano kaj vivo de la bestoj kaj homoj.*

Se vi ŝatus partopreni sed ne scias kiel prelegi pri via kampo (ekzemple, mankas al vi esprimoj aŭ lerto pri tiel prelegi), indiku tion en via mesaĝo - SFA pretas helpi vin!

### **Peĉakuĉo**

Peĉakuĉo estas interesa prezentformato de mallongaj elpaŝoj, intence limigitaj je formo kaj daŭro. La celo de tiaj prezentadoj estas rapide konatigi la spektantojn kun diversaj interesaj ideoj, projektoj kaj temoj.

Dum JES 2014/15 ni ankaŭ dezirus okazigi Peĉakuĉon, do se vi emas rakonti al homoj pri temo vi estas pasie pri ne dubu, skribu al [paulwuerztz@posteo.de](mailto:paulwuerztz@posteo.de), anonci vian temon kaj preparu prezentadon por disdoni ideojn.

### **Librokesto (Julia Noe)**

La esenco de librokrucigo (bookcrossing) estas la “elliberigo” de libroj en la “sovaĝejon” por sekvi iliajn vojaĝojn same kiel la vivojn, kiujn ili tuŝis. La libroj krucas la vojon de tiuj, kiuj ŝatas legi ilin kaj daŭrigas. Post kiam oni legis la libron (aŭ ankaŭ ne), oni mem elliberigas la libron denove. Ekzemple oni lasas ĝin en trinkejo, en trajno aŭ en parko, tiel ke homoj povas trovi ĝin – aŭ oni povas doni ĝin al amiko aŭ konato.

Mia portebla librokesto troviĝos supozeble en la teretaĝo de la ĉefa konstruaĵo proksime al programtabulo. El ĝi ĉiuj povas libere preni librojn por legi surloke aŭ kunpreni hejmen. Se vi ŝatas la ideon kunportu librojn kaj interŝanĝu aŭ nur elprenu se vi ne havas propran libron por fordoni.

Pliaj informoj: [www.bookcrossing.com](http://www.bookcrossing.com) (diverslingve, esperanta versio planota)

### **Kontraŭdiskriminacia teamo**

Ekzistas novaĵo en Esperantujo: kontraŭdiskriminacian teamo, kiu helpas prizorgi vian sekurecon, liberecon kaj komfortecon. Se dum nia aranĝo vi havos iajn malagrablajn spertojn rilate al seksĝenado, diskriminacio aŭ aliaj konfliktoj kun aliaj partoprenantoj, ne hezitu alparoli la anojn de la teamo, ili volonte provos trovi solvon kune kun vi.

Ĝisdatigoj kaj novaj informoj troveblas ĉe <http://jes.pej.pl> kaj ĉe Facebook je <https://www.facebook.com/junularaesemajno>

Se vi havas ian demandon, nepre sendu retmesaĝon al [jes@pej.pl](mailto:jes@pej.pl) !